# *Speciala atentigo pri pluvoj sojle de la uragansezona komenco*





**foto: Insmet**

Havano, maj 31 (RHK) La kuba instituto pri meteologio atentigis pri la ?eesto de lar?a areo de malaltaj premoj kun malrapida movi?o en la najbareco de la Duoninsulo de Jukatano kaj la nordokcidento de la Kariba Maro, konservos la probablon de pluvoj alta en la okcidentaj kaj centraj regionoj dum la venontaj tagoj.

Kiel raportis al la gazeto  Granma D-rino Miriam Teresita Llanes Monteagudo, estro de la Prognoza Centro de la Instituto pri Meteologio, estas necerteco rilate la estontan evoluon de tiu sistemo, tial nuntempe la plej grava afero por Kubo estas la prognozo de pluvo por amba? regionoj , kiu povus esti forta kaj intensa en kelkaj lokoj.

Pro sia proksimeco al nia lando, la Prognoza Centro atentos ?i tiun zonon de perturbita vetero kaj, se necese, faros specialajn avertojn.

Kiel notis D-ro Miriam Teresita, oni devas atenti la informojn, kiujn la Prognoza Centro disponigos pri ?i tiu kompleksa meteologia situacio.

Preter marki la komencon de la ciklona sezono, junio estas la plej pluva monato de la jaro en Kubo, konduto preska? ?iam asociita kun la ?eesto de atmosferaj eventoj kiuj ka?zas signifajn pluvojn (ili kutime da?ras plurajn tagojn), ?efe en la unuaj  dekdu tagoj , ka?zita de tropikaj ondoj kaj malkulminoj kaj ilia interago kun mez-latitudaj sistemoj, kaj la rekta a? nerekta influo de iu ciklona organismo.

Fonto: Granma

---

[https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/ciencias/289354-speciala-atentigo-pri-pluvoj-sojle-de-la-uragansezona-komenco](https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/ciencias/289354-speciala-atentigo-pri-pluvoj-sojle-de-la-uragansezona-komenco)

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**